



# BULTENO

de Esperantista Klubo en Praha  
Věstník Klubu esperantistů v Praze  
pošt. schr. 1069 111 21 Praha 1

N-ro 2/2002(165)

Červenec / julio 2002

Enhavo - Obsah:

La jarkunveno de nia klubo	2
La penso de D-ro Zamenhof	3
Z. Bergrová: Bobelo	4
Eli Urbanová pri D-ro Tomáš Pumpř	6
Č. Vidman: Adiaŭ al Eva - Lumado	8
A. Sova: Táborské kraje	11

## La Solenaĵoj

de la 100-a datreveno de la Esperantista Klubo en Praha  
kaj la 10-a kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio  
okazos de la 15-a ĝis la 17-a de novembro 2002  
en la Kulturcentro "Zahrada" (Ĝardeno),  
Malenická-str. 1784, Praha 4 - Chodov



kun jena programo:

- 15. 11. 2002, vendrede - vespere Kulturprogramo honore al la jubileo de la Klubo
- 16. 11. 2002, sabate - antaŭtagmeze la 10-a Kongreso de ĈEA  
posttagmeze la elekto de nova komitato de ĈEA  
vespere dancamuzo kun tombolo
- 17. 11. 2002, dimanĉe - antaŭtagmeze kunvenoj de sekcioj kaj komisionoj  
tagmeze fino de la Solenaĵoj.



## Oslavy 100. výročí Klubu esperantistů v Praze a 10. sjezd Českého esperantského svazu

se budou konat 15.-17. listopadu 2002 v Kulturním centru „Zahrada“ v Praze 4 - Chodově, Malenická 1784.

## La jarkunveno de nia klubo okazis la 14an de marto 2002.

La kunvenon partoprenis trideko da membroj de nia klubo kaj de gastoj. Venis s-anoj M. Smyčka el Ústí n.L. kaj L. Chytil el Přerov, ĉeestis ankaŭ nia poetino Eli Urbanová kaj por mallonga tempo venis ankaŭ niaj simpatiantoj poetino Z. Bergrová kaj ŝia edzo pentristo kaj skulptisto V. Berger. Sur la muro estas pendigita la historia kluba standardo kun la brodita surskribo „Esperantista Klubo de Praha“.

Post la bonvenigo fare de la kluba prezidanto oni honoris per unuminuta silento la forpasintan prof. D-ron Rudolf Horský.

Post tio la prezidanto prezentis raporton pri la agado de la klubo en la periodo 2001/2002. Li konstatis, ke nun la klubo havas denove novan kunvenejon, nome en la strato Ve Smečkách n-ro 25, do en la centro de la urbo, proksime al la Venceslaa placo.

La programo de niaj kunvenoj estas kutime konversacia, sed okazis ankaŭ kelkaj kunvenoj kun interesaj prelegoj, kiel ekz. la 30an de aprilo 2001 s-anino Eli Urbanová prezentis al ni sian novan poemkolekton „Viroj, vino kaj kantado“, la 4an de junio s-ano O. Schweber el Ostrava rakontis al ni pri la UK en Berlino, la 4an de oktobro kaj denove la 1an de novembro s-anino S. Kníchalová rakontis kaj montris fotografiaĵojn pri sia vizito al Ĉinio; la 13an de decembro ni havis jam kutiman kristnaskan kaj Zamenhof-vesperon kun rememoro pri la aŭtoro de Esperanto kaj kun kantado de kristnaskaj kantoj. Tiun ĉi kunvenon partoprenis ankaŭ eksterpragaj (ekz. s-ano Smyčka) kaj eksterlandaj gastoj.

La averaĝa nombro de partoprenantoj de niaj kunvenoj estis 20, kelkfoje venis ankaŭ eksterlandaj gastoj, kiel Neven Kovačič el Bruselo aŭ Akira Okada el Japanio.

Niaj kunvenoj ne okazis dum la someraj monatoj, sed la 18an de aŭgusto efektiviĝis denove la kunveno en la somera domo de s-anino Maudrová en Karlštejn; tie ĉeestis ankaŭ gastoj el aliaj urboj, kiel J. Rýznarová, d-ro Hradil aŭ s-ano Sládeček.

Iuj klubanoj kunlaboris kun la Asocio de esperantistoj-handikapuloj partoprenante iliajn kunvenojn kaj ankaŭ la seminariojn en Skokovy. Kelkaj kunvenoj de AEH okazis en Prago, en nia kunvenejo.

Sed niaj klubanoj partoprenis ankaŭ aliajn aranĝojn, eĉ internaciajn, ekz. la Universalan Kongreson en Zagrebo (d-ro Chrdle, Maudr, Helmečiová, Skalická, Kovaříková, Zubová), aŭ la OSIEK-konferencon en Strážnice (d-ro Chrdle, Patera).

La 7an de februaro ĉi-jara ni partoprenis la solenaĵon honore al la 80-jariĝo de nia membrino, la honora membro de ĈEA kaj de UEA kaj mondkonata poetino Eli Urbanová. La solenaĵon aranĝis ĈEA en la registara salono de la Ĉefa fervoja stacidomo en Prago kaj partoprenis ĝin kvindekda geesperantistoj el la tuta lando. La Internacia OSIEK-konferenco en Strážnice elektis por la Libro de la jaro la aŭtobiografia romanon de Eli Urbanová „Hetajro dancas“.

Ĉi-loke mi aldonu, ke nia membrino Pavla Zemanová partoprenis en literatura konkurso de Esperantista kulturdomo „D-ro Ivan Kirĉev“ en Razgrad, Bulgario, kaj ricevis diplomon por sia rakonto „Granda hundo“.

Prof. Jaroslav Mráz el Rokycany, kiu kunlaboras kun nia klubo, tradukis (kun M. Malovec) la poemarojn „Vortoj de nokto“ de Z. Bergrová kaj „Kantato“ de V. Ludíková; ambaŭ verkoj estas prespretaj.

La firmo KAVA-PECH de d-ro Chrdle aperigis ĉeĥlingvan tradukon de esperantlingva verko de Valdemar Vinař „Skandál kolem Josefa“. La sama firmo aranĝis ankaŭ biciklistan renkontiĝon de esperantistoj IBIRE en septembro 2001 en Doksy.

Pasintjare aperis entute kvar numeroj de nia Bulteno kaj antaŭ nelonge - honore al la 100-jariĝo de nia klubo aperis nova bildkarto pri Prago - eĉ kun la bildo de nia E-monumento.

En novembro la kluba prezidanto traktis kun funkciulo de Magistrato de la ĉefurbo Prago Ing. Peterka pri ebleco doni nomon „Esperantská“ al iu nova strato en Prago. Li promesis subteni nian proponon, sed ŝajnas, ke ni devos ankoraŭ pli multe premi al li.

Kelkaj niaj klubanoj laboras ankaŭ en superaj organoj de nia movado: P. Chrdle estas vicprezidanto de ĈEA, J. Ondráček estas komitatano de ĈEA, Z. Pluhař estas estro de Libroservo

de ĈEA.

La komitato de la klubo kiel kutime ne laboris, nur laŭbezone urĝajn aferojn solvis Patera, Ondráček, Maudrová, Trojan.

La klubo kasisto s-ano J. Ondráček prezentis Raporton pri la financa mastrumado de la klubo en la j. 2001. La financa stato de la klubo komence de la jaro 2001 esbs 28 mil kronoj, la enspezoj konsistantaj el kotizoj, donacoj kaj ŝparkasaj interezoj atingis la sumon de 14 mil kronoj, la elspezoj precipe por la presado kaj afranko por Bulteno estis 23 mil kronoj, sekve la fina stato de niaj financaj rimedoj estas 19 mil kronoj.

En la diskuto s-ano Ludvík Chytil el Přerov salutis nian klubon en la nomo de esperantistoj de Přerov kaj ankaŭ en la nomo de la prezidantino de ĈEA s-anino V. Podhradská. Li prezentis kaj donacis al nia klubo multajn broŝurojn kaj prospektojn pri Přerov kaj pri la centra Moravio. Same s-ano M. Smyčka salutis nian klubon en la nomo de la klubo en Ústí n.L. kaj invitis nin al la Festivalo en Ústí kaj al la Ĉeĥa-saksa tágo.

El la ampleksa elpaŝo de d-ro Chrdle mi menciuj nur kelkajn pli gravajn: post unu semajno aperos nova eldono de la originala esperanta verko de V. Vinař Skandalo pro Jozefo, la 16an de aprilo je la 17a horo okazos kunveno kun la vicprezidanto de UEA H. Tonkin en hotelo Mucha en Karlín (kiu volas ĉeesti, tiu anoncu sin al d-ro Chrdle), ĈEA eldonas retkomunikojn, kiu posedas Interreton, tiu povas ricevadi ilin, grava informo: la 10a kongreso de ĈEA kaj la solenaĵoj de la Esperantista Klubo en Prago okazos jam de la 15a ĝis la 17a de novembro 2002, do ne inter la 22.-24. de novembro kiel estis prezentite en la antaŭa numero de Bulteno. En la kultura parto de la solenaĵoj verŝajne partoprenos s-anino Puňová, s-ano Bronštejn el Rusio, kompreneble M. Smyčka k.a. En la jaro 2003 somere okazos en Prago la Internacia OSIEK-konferenco, sed samtempe okazos kolokvo de interlingvistoj en la kadro de Monda Kongreso de Lingvistoj en Prago.

Fine de la jarkunveno la ĉeestantoj aprobis la raporton de la prezidanto kaj la finanĉan raporton de la kasisto. Nova komitato ne estis elektata, ĉar ne estas sufiĉe da homoj por formi ĝin. Sekve la ĝisnuna komitato laboros ankoraŭ unu jaron.

Protokolis Jiří Patera

## **La penso de D-ro Zamenhof fronte al aktualeco**

Zorgoplena jam de sia infanaĝo pro la serĉado de la paco, D-ro Zamenhof, patro de la Internacia Lingvo Esperanto, rifuzis esti proponita por la Nobel-premio en 1909. Sekve de peto partopreni en la unua kongreso de la Tutmonda Esperantista Hebrea Asocio, en 1914, li malakceptis la inviton per jenaj vortoj:

„Mi mem bedaŭrinde devas stari flanke de la afero,“ li skribis al ili, „ĉar laŭ miaj konvinkoj mi estas homarano, kaj ne povas ligi min kun la celado kaj idealoj de speciala gento aŭ religio. Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon, kaj ke la celado de ĉiuj homoj devus esti: krei harmonian homaron. Estas vero, ke la nacionalismo de gentoj premataj - kiel nature sindefenda ago - estas multe pli pardoninda, ol la nacionalismo de gentoj premantaj; sed, se la nacionalismo de fortuloj estas nenobla, la nacionalismo de malfortuloj estas neprudenta; ambaŭ naskas kaj subtenas unu la alian, kaj prezentas eraran rondon de malfeliĉoj, el kiuj la homaro neniam eliros, se ĉiu el ni ne oferos sian grupan memamon kaj ne penos stariĝi sur grundo tute neŭtrala. Tio estas la kauzo, pro kiu mi, malgraŭ la korŝirantaj suferoj de mia gento, ne volas ligi min kun hebrea nacionalismo, sed mi volas labori nur por interhoma justeco absoluta. Mi estas profunde konvinkita, ke per tio mi alportos al mia malfeliĉa gento multe pli da bono, ol per celado nacionalisma.\*

Jardekoj da malfeliĉaĵoj kaj kruelaĵoj neniam ĉesis konfirmi la klarvidon de Zamenhof rilate la naciismojn kaj la politikajn kaj religiajn ekstremismojn. Nu, en Francio estas pli facile enkonduki Halloween en la instrueblajn ol pripensadon pri D-ro Zamenhof, lia verko, lia penso, pri la lingvo kiun li donacis al la mondo.

(El „Bulletin d'Avignon, transdonita de H. Masson per Interreto)

## Bobelo

Estis iu fantomo, kaj tiu timis. Ĝi terure timis homojn. Ĝi naskiĝis en la tempo, kiam la malnovtempaj fantomoj jam estas formor-tantaj, koncize dirite ĝuste antaŭ nelonge. Fantomo havas eĉ neniujn gepatrojn, ĝi simple estiĝas nur tiel senkaŭze, ĝi estas orfo. Aŭ orfino, ni nomos ŝin Bobelo, aŭ ĉu prefere Bububuo? Kio pli multe plaĉas al vi. Do bone, Bobelo.

Bobelo ricevis eĉ neniujn potencajn sorĉ-diraĵojn kaj saĝaĵojn en la kunveno de fantomoj. Vi certe scias, por kio estas sorĉdiraĵoj, sed por esti certa, se iu tion ne sciis, ĉar li ne estis atentema aŭskultante fabelojn, aŭ almenaŭ rigardante ilin en la televido, do sorĉdiraĵoj elvokas sorĉojn, por ke estu kiel kaj per kio timigi. Bobelon baldaŭ turmentis, ke ŝi ne havas je dispono grandajn sorĉdiraĵojn, kaj strebis iujn imiti. Sed kie. De kiu. Eblas diri imiti, sed sorĉistinoj ne plu estas, senkapaj kavaliroj ankaŭ ne, ekzistas eble senkapaj homoj, sed ĝuste tiujn Bobelo timis mem.

Da fantomoj estas ĉiam ankoraŭ sufiĉe, iam ŝajnas, ke ili estas eĉ pli multaj ol antaŭe, sed ili estas ĉiam novaj, tiuj, kiujn elpensis la sen- kapaj homoj kaj de tiuj imiti la sorĉadon ne eblas. Ĝi estas ekzemple milito. Pri tio oni ĉiam skribas, vidas sur la ekrano kaj aŭdas en la radio – milito estas tie kaj tie, ĉie kuŝas multe da mortigitoj aŭ vunditoj, ankaŭ infanoj, multe da domoj estas detruitaj, homoj ne havas lokon por loĝi, ili fuĝas, sed kion oni povas de tio imiti por timigi bele malnovmaniere kiel ar- barfeoj, grotsorĉistino, vaglumoj, muĝfeino, kaj kiel ĉio povus fine malnovmaniere bone finiĝi. Tiel, por ke la malbono estu punita kaj la bono venku.

Militon faras homoj kaj dume – homoj ĝin timas. Kaj reciproke ili minacas per ĝi. Tion Bobelo ne kapablis imagi, ke iu faras ion, kion li mem timas. Kaj ŝi ne povis havi ideon, kiel tian minacadon imiti. Vi certe konsentas kun mi, ke timigi estas io simila kiel minaci. Bobelo povus timigi sole per tio, ke ŝi ie aperus, sed ŝi eĉ ne sciis, kiel ŝi devus aspekti, por ke iu lasu sin trompi kaj timu.

Kian timegon povas Bobelo ellasi sur homojn? Eble ankoraŭ al infanoj ŝi povus ie de post angulo pafekkrii, sed ankaŭ infanoj primokus ŝin. Ili havas proprajn fantomojn, malbonajn notojn en la lernejo – aŭ ankoraŭ pli malbonan danĝeron. Hejme oni diras al ili, ke de neniu fremda homo ili prenu bombonojn, ĉokoladon kaj entute neniun manĝaĵon, eĉ se tio estus glaciaĵo. Kial? Ĉar la malbonaj fremdaj homoj – denove homoj – atendas ĉe la lernejo por povi al fidemaj infanoj proponi ion bonan, eble nur pulvoron kiel ŝaŭmpulvoro, kaj kiam iu infano lasas sin kapti kaj formanĝas tion, ĝi vidas unue belajn fantomojn. Poste ĝi volas ĉiam gluti la pulvoron, post kiu ĝi vidas ilin, sed la malbonaj homoj ne plu ion disdonas, sed la pulvoron vendas – kaj multe-koste. La infano eble eĉ ŝtelas, por povi aĉeti al si la fantometojn, sed la belaj fantomoj ŝanĝiĝas en terurajn, pli malbonajn ol estis drakoj. La infano estas malsana, tute ĝi tremas kaj mortas pro terurego. Fi.

Tiu ĉi minaco estas vera hororo. Tio estas nenio por Bobelo. Ŝi eĉ ion similan ne scipovus kaj ne volus fari. Kompreneble Bobelo estas fantomo, do kion nun. Ĝis ŝi ekhavis ideon. Ŝi ja verdire timigi ne devas. Kial ŝi devus fari ion tiel malbonan kaj malsaĝan. Ŝi povas prefere averti.

Kaj ŝi tuj ekagis. En la lernejo en koridoro ŝi transformiĝis en la diinon Vesna. Ŝi havis disligitajn harojn, grandajn bluajn okulojn, levitan nazon, korpon kiel feino, kaj ĉefe bele- gan, malpezan, tre mallongan robon. Ĝi ja estis mallonga, sed ĝi flirtis ĉirkaŭ ŝi ĉe ĉiu blovo. Kaj ŝi atendis la paŭzon.

Post kiam sonoris, infanoj elkuris en la koridoron kaj tuj ili rimarkis Bobelon.

„Aŭdu,“ diris Jarĉjo, „kio vi estas kaj kion vi faras ĉi tie?“

„Mi estas, moŝtoj, Vesna,“ prezentis sin Bobelo.

„Ĉu Vesna?“ miris la infanoj.

„Jes, Vesna.“

„Kaj kiu fantomo estas tiu Vesna,“ diris Zunjo.

„Vesna estas slava diino de printempo,“ malestime instrukciis Joĉjo. „Ĉu tion ĉi vi ne scias? Kaj la diino de vintro estas Morana, tiun ni printempe ĵetas en akvon, por ke ĝi ne ĝenu.“

„Ĝi estas printempo, tiu Vesna,“ aliĝis Petra.

„Do printempo. Sed ŝi aspektas pli vere kiel artosketantino. Oni ricevus pro ŝi frosto-haŭton,“ alparolis Jana.

„Ĉu vi estas Vesna? Vi malsaĝa fantomo?“ vortatakis Romano.

„Jes,“ diris dignoplene Bobelo. „Mi estas ĝuste Vesna, sed neniu senigos sin de iu diino, ĵetinte ŝin en akvon, ni estas senmortaj.“

„Ĥa, ĥa,“ ridis la infanoj.

„Ĉu vi scias, kion fari,“ malice proponis Paŭlo, „ni elĵetos ŝin tra fenestro kaj tuj ni vidos.“

Bobelo ektimis, ŝi ne sciis, kion fantomo faru, kiam iu volas elĵeti ĝin tra fenestro. Sed ŝi ne vidigis siajn embarasojn.

„Kial vi elĵetus min, mi estas utila,“ ŝi protestis.

„Ĥa, ĥa,“ ridis la infanoj. Kaj Helena diris:

„Ŝi pravas, kial ŝin tuj trafenestrigi, ŝi estas amuza, kaj tio, kion ŝi surhavas, estas rekte por modparado.“

„Ĥa, ĥa,“ ridis la infanoj kaj Johana aldonis:

„Nu klare, por maskobalo. Sed kion ŝi propre faras ĉi tie, tion ŝi devus diri.“

„Fine prudenta parolo,“ ekparolis Bobelo. „Mi venis vin averti.“

„Kaj kontraŭ kio?“ miris la infanoj.

„Erika, montru, kion vi havas en la poŝo,“ daŭrigis Bobelo.

Erika ekruĝetis kaj elprenis cigaredojn.

„Kion, nur cigaredojn.“

„Cigaredoj estas ĉiam abomenaĵo,“ krivoĉis Bobelo. „Vi alkiutimiĝos al ili kaj fariĝos sklavo. Ĉu vi volas esti sklavo? Kaj tiuj ĉi plie estas el majorano, kiel vi nomas mariĥuanon.“

„Kia zorgo, vi savarmeo,“ ekgrimacis Erika. „Majorano estas sendanĝera – tiu ĝuste estas utila – kaj ne vi.“

„Ĥa, ĥa,“ ekridis nun Bobelo. „Bele sendan-ĝera kaj utila. Ĝi estas drogo kaj la drogoj estas danĝeraj preskaŭ kiel – la milito.“

„La milito estas abomenaĵo, jes ja,“ konsentis Jarĉjo. „Sed majorano – tute ne.“

„Vi konvinkiĝos. Kaj poste vi devos promesi al mi, ke dum la tuta vivo vi estos kontraŭ drogoj – kaj kontraŭ militoj.“

„Ĉu ni? Kiel ni povas esti kontraŭ militoj. Verdire ni estas kontraŭ ili, sed – kiom ĝi utilos?“ konstatis Helena.

„Multe ĝi utilas. Ĉu buboj interbatiĝas? Interbatiĝas. Do tio estas komenco de ĉiuj militoj.“

„Nu kion vi ne volus. Ke buboj ne inter-batiĝu?“ diris Joĉjo.

„Certe. Ili povas kune konkuri alimaniere. Eble en la sporto, aŭ en la fiziko...“

„Ĥa, ĥa,“ denove ekridis la infanoj.

„Aŭ en la fumado de majorano,“ sufokiĝis pro rido Romano.

Bobelo sciis, ke tiamaniere ŝi ne venkos. Sed ŝi havis ion en la maniko, kiel oni diras. Ŝi ekgrumblis mallaŭte sorĉe-vorte-huŝ kaj al-vokis per tiu ĉi malforta, malnova sorĉe-sentenco tamen nur sorĉon, por ke la infanoj eksciuj tuj, kio ĉiuokaze baldaŭ fariĝos evidenta. Ŝi sukcesis fari, kion ŝi volis. En la koridoro enkurigis incitita Sonja kaj vokis:

„Imagu, en nia klaso iu bubino mortis.“

Momenton estis silente.

„Kio okazis al ŝi,“ demandis Jarĉjo.

„Ŝi mortis pro drogoj. Ŝi injektis en sian vejnon heroinon.“

„Sandra,“ ekflustris Erika.

„Jes, Sandra,“ konfirmis Sonja. „Antaŭe ŝi fumis majoranon, sed poste tio ne plu sufiĉis al ŝi, tial ŝi pikadis al si heroinon. Ŝi devis. Ŝi ricevadis unu malbonan noton post alia, hejme ŝi ankaŭ sentis sin iel strange. Ĵus venis ŝia patro kaj diris en la klaso, ke ŝi mortis. Ŝi estas senviva kaj ŝi havos sepulton.“

„Nu vidu,“ ligis la parolon Bobelo. „Kaj laŭdire majorano estas sendanĝera kaj utila.“

„Kiam ŝi tamen devis,“ ploreme singultis Erika.

„Nenion ŝi devis, tio estas sensencaĵo,“ daŭrigis Bobelo. „Ŝi ĉion al si nur plimal- bonigadis. Ĝuste per majorano ŝi ĉion mal- bonigadis.“

„Nu jes, sed kion ŝi estis faronta,“ diris Paŭlo.

„Ŝi devis telefoni al la konfidenc-linio – sed entute – plej bone estus neniam rilati kun majorano.“

Sed tiumomente jam sonoritis. La infanoj observis Bobelon scivoleme, kaj estis klare, ke ili iom ne kredas al ŝi. Sed Bobelo ne emis cedi.

„Moŝtoj, ni renkontiĝos antaŭ la lernejo,“ ŝi sukcesis ankoraŭ diri.

Post la instruado ne atendis antaŭ la lernejo Bobelo sola. Estis tie ankaŭ neokulfrapa viro, kiu havis en unu mano saketon da bombonoj kaj en la alia cigaredojn. Infanoj alkuris ĉirkaŭ ilin. Ili rigardis de unu al la alia.

„Do nun ni ekkonkuros,“ diris Bobelo.

Kaj ŝi komencis pufiĝi. Ŝi pufiĝis kaj pufiĝis, ĝis ŝi estis je kapo pli granda ol tiu viro. La infanoj iun surprizon de Vesna atendis kaj ĝojegis, sed la neokulfrapa viro pro mirego malfermis la buŝon. Kaj ĉar li estis mirrigida kaj havis ambaŭ manojn plenajn, Bobelo povis rapide eltiri el lia mano la saketon kaj la bombonojn enŝuti en lian malfermitan buŝon. Post tio ŝi ankoraŭ puŝis la malmolajn bombonojn tra lia gorĝo malsupren, kvazaŭ oni kropŝtopas la anseron. Li nur ĝemegis...

„Do sinjoro drogaĉulo, funebrulo,“ forigis Bobelo la manojn.

La viro kun konfuzitaj okulegoj lasis fali la cigaredojn kaj ŝanceliris al sia aŭto. Jana prenis la cigaredojn kaj ĵetis ilin en kloakon.

Erika ĵetis tien ankaŭ la siajn.

„Drogaĉulo, ci aŭtulo kaj stultulo,“ la infanoj mokis la venkitan ulon.

La viro rapide enaŭtiĝis kaj forveturis, sed iel strange zigzagante la ŝoseon.

Bobelo estis ree nur tiel granda kiel la infanoj kaj ridis kun ili.

„Mi estas neniu diino, mi ne estas Vesna,“ ŝi diris, „mi estas Bobelo.“

Kaj ŝi malaperis.

*(El ĉeĥa manuskripto tradukis Jiří Patera)*

## **Eli Urbanová pri D-ro Tomáš Pumpr**

### **Pumpr**

Kafejo en la partero de Hotelo Eŭropo sur la Venceslaa Placo surprizas la nove-venantan per sia konstruiteco. Ĝia iama posedanto ne ŝparis kapitalon. La dekoraciistoj, al kiuj li konfidis ĝian ornamon, transdonis laboron indan de majstroj. Kolonsokloj estas garnitaj per lignaj marketroj kaj tenere vejnumita marmoro. Ankaŭ tabuloj de rondaj tabletoj estas el marmoro, apogiloj de seĝoj estas fleksformitaj. La kaskade prilumitan ejon borderas spaca galerio.

Ĉi tie en tiu agrabla medio mi renkontiĝis kun doktoro Pumpr. Vi miras, ĉu? Vi embarase skuas la kapon? Kiu tion aŭdis, ke ia ino invitu viron al grogo? Povra Pumpr! Vi ne emus esti sur lia loko! Aŭ vi eble emus. Emu, ne emu, tiun ĉi fojon vi superflue suspektas min. Arogo tio kompreneble estis kaj granda. Tio, ke mi verkis kelkajn poemetojn, ankoraŭ nenion signifas. Tio estas normala. Tenti la muzon apartenas al la afero. Mi ne konas esperantiston, kiu ne skribus almenaŭ rimaĵon. Tion faras tiu belsoneco. Tiu poezio en Esperanton ensorĉita. Sed Pumpr, li estas pinto. Lukáš, Hromada, Pumpr estas niaj plej bonaj tradukistoj. Oni nomas ilin „ora trio“.

Lukáš, profesoro de gimnazio, poligloto, Esperanta poeto, tradukis la triaktan komedion de Vrchlický Nokto en Karlštejn kiun oni prezentis okaze de la Universala Esperanto-Kongreso en Prago en la jaro dudek unu.

La ekintereso de Hromada pri Šrámek, lia liriko, havas sian motivon. Šrámek estas preferata poeto de Suchardová. Ĝus antaŭ nelonge ŝi recitis lian poemon de aŭtuna pluva tago Bela mia Eva...

Hromada - vi eĉ ne memorigu lin al mi. Tia atakanto. Estis somere, mi malfermis al li surhavante bankostumon. Ĉu mi povis scii, kiu sonorilas? En bankostumo de karmina koloro, duparta, sen

portiloj, pri kiu Hela deklaris „en tiu vi delogos ĉiun“. Klare, ke li insistis. - Eli, restu, kiel vi estas... - Eli, kantu al mi la Vagabondon...

Vane mi elturniĝadis, ke sen piana akompano ĝi ne estos kompleta. - Eli, komencu... Do mi precize kiel pasinte promenas sur la tapiŝo, li precize kiel pasinte koncentriĝe aŭskultas... Mi stulta! Ĉar apenaŭ mi estis je la atingo, lia mano elĵetiĝis - kanajlo, li senigis al mi la mamzonon! Hromada - tiun al mi eĉ ne memorigu! Ĉi tiel superruzi min! Nur poste mi kuris por la hejma mantelo....

Pumpr famiĝis per la traduko de libretoj de la operoj *En Puto*, *Vendita Fianĉino* kaj *Najado*, kiujn elsendadis Verda Stacio en Brno kaj kiujn reagis esperantistoj el la tuta mondo. Kaj memkomprene per la traduko de *Bukedo* de Erben. „De l' grundo rulis sin la ondoj, disiĝis kiel vastaj rondoj... La rusa legendo Bapto de Caro Vladimír estos en la traduko de Pumpr por la Okcidento invento. „Unu mont' al nuboj kreskis, unu kreskis fuŝe - iu havas muzikbandon, iu fajfas buŝe...“ Eĉ se lia brila traduko ne estas ĉiam laŭvorta, per tio, ke Pumpr ĉi tie uzis internajn rimojn, li konservis, ja substrekis la spritecon de Havlíček. La verkon de eksterordinara valoro ilustris la nacia artisto Lada - rave! La lasta laboro de Pumpr, lia traduko de *Majo* de Mácha estas preparita en manuskripto. Laŭ Rumler neniu el la ĝisnunaj fremdlingvaj tradukoj atingas la nivelon de la originalo, sole tiu de Pumpr plurloke al ĝi proksimiĝas. „Unua maja postvesper', vespera maj', la amsezon'...“ Mi permesas al mi koncizan resumon: Erben estas rakontanto de popolaj fabeloj. Havlíček reprezentanto de bruska realismo. Mácha, pura romantikulo. Pumpr en siaj tradukoj sukcesis esprimi ĉiujn tri lingvajn ĝenrojn. Pumpr estas simple majstro.

Kaj al tia homo mi rabas la tempon. Mi tion al mi vere riproĉas. Sed fine estas konvena okazo kontakti Demandi kion li juĝas pri la poemo *Hetajro dancas*. Nome Baghy al mi sendis sian fotografajon. Kiel longe li serĉis ĝin kaj kiel li ĉagrenis, kiam li ne trovis ian alian, laŭdire „ne nur la tenera sekso estas vanta“... En la unua momento mi konsterniĝis. Baghy, vi aspektas! La nazon vi havas kiel Cyrano, la vizaĝon falto apud falto... Kiel amike li ridetas... La zorge glatigitaj haroj kombitaj dorsen, sen vojeto, ŝajnas densaj, ĝis nun nigraj... Se li demetus la okulvitrojn - ĉe iom da fantazio - Ĝi estis inspiro kiel tondro. Mia amato, kompreneble multe pli bela, min rigardas el ora kadro kaj mi, ankaŭ multe pli perfekta, por li dancas... Plej frue mi demetas la veluron, poste la punton.. *Hetajro dancas*. Tiel longe ŝin Ŝtefo al mi antaŭĵetis, tiel longe ŝin prezentis al mi kiel modelon, ĝis la *Hetajro* viviĝis.

Sed kie estas tiu seka patrono, kiun mi ĝis hodiaŭ en Pumpr vidis, kien li malaperis, kien li perdiĝis. Ĉu tio ĉi estas Pumpr, tiu ruĝvanga bonvivanto ne kaŝanta sian entuziasmon? La Sapfa verso, en kiun mi la hetajron vestis, estas por Pumpr io kiel frandaĵo. Kun kia gusto li ĝin legas al si, kun kia ĝuo li ĝin analizas, kiel gastronome li ĝin rulas sur la lango! Tio estas tiuj tipoj, kiujn ĝojigas, kiam ili povas mergiĝi en fremdan verkon, kiam ili povas pensi kun la aŭtoro, kiam ili identiĝas kun li kiel nur eble. Jen kion mi ne kapablas, se mi min distranĉus. Mi kapablas esti sole mi mem. Tio estas tiuj tipoj - mi ne povus traduki kaj Pumpr ne povus esti poeto, por tio estas li tro sobra, tro prudenta, tro singardema... Pumpron karakterizas jena eldiro: „Mi ŝatas, se certaj aferoj restas post la kurteno kaj mi ne sentas min bone, se oni tiun ĉi vualon abrupte deigas. Sed min ne obeu!“ Sen zorgo, sinjoro doktoro! Ne nur ke mi ne obeas vin, mi la demeton de la kurteno intence sekvas kiel unu el la tavoloj de tiu ĉi prozo...

Mi ne apartenas al la poetoj, kiuj ŝvebadas. Mi apartenas al tiuj, kiujn bruligas interna fajro. Mi promenas sur la trotuaro pelata de impresoj. Ne gravas, male, mi ĝojas, ke mia tramo ne venas... Jen la Hotelo Eŭropo de ekstere. Da tiuj niĉoj kaj balkonoj! Kaj supre la oritaj gracioj kaj infre tiu markezo... Mi volus verki tiom, tiom pri mi, pri Ŝtefo, pri Ĉaslav, pri Prago, pri bestetoj, pri maro, mia kreado devas esti bunta... Pumpr kaj la komencanta poetino. Mi pensis, ke li estos nervoza, ke li rigardos la manhorloĝon, ke li rapidos... Kion li gajnis dediĉante sin al mi? La Sapfa verso. Kiel humile ĝi atendas je sia reviviĝo! Ĝi montriĝas al mi en sia tuta belo kaj altireco. ...

## Herooj de la zodiako

„Vi entuziasmigis min. Vivu Zodiako! Ha! Vi! Jes, jes! Amen!“ Tiel sprite reagis Pumpr, kiam li legis mian ciklon Herooj de la zodiako. Por ke vi komprenu liajn aludojn, aŭskultu ekzemple la poemon Pesilo: Ekstrem' apenaŭ vin altiri povas;/ sur meza vojo vi feliĉon trovas. / Se du batalas,

ĉu ne, vi kun ŝato / pacigas ilin. Ej, vi diplomato, / vi! / Vi mem malofte bagatelojn solvos. / Venos okazo, kiam vi disvolvos / ankoraŭ unu el talentoj viaj: / Dum vi komandos, kuros la aliaj, / vi! / Karakteriza estas plu por vi, ke / al ekvilibro strebas vi taktike. / Ĉu jam eksmoda ŝajnas al vi loto / de ŝnur-dancisto? Iĝu do piloto, / vi! / Vi tro meditas super ĉiuj taskoj: / Fama azeno inter fojnofaskoj. / Ĉar vero garavs same kiel belo. / Pesnadlo vibra! Trema vi libelo, / vi! / Preterdire, verkante ĝin mi imagis Ŝtefon, kiu sub tiu ĉi signo naskiĝis. Agnosku, ke mi lin prilaboris bele...

---

Ĉestmír Vidman

### Loučení s Evou

Jak se vešly kostýmy těch desítek postav  
do malé garsonky  
na předměstí Prahy?

Všechno bylo důmyslně poskládáno  
jedno do druhého  
jako ty známé ruské panenky

A to tam byla ještě galerie figurek  
krásného Betléma co sis vysloužila  
od řezbáře Hoška z Dobříše

A police plné knih až do stropu  
A materiál k rolím A plno rekvizit  
v tom minipokojíku

s tolika nápady  
a vždycky s květinami  
vysoko nad Prahou

Ostýchám se podívat na tu terásku  
odkud jsi mi mávala když jsem odcházel  
protože jsi se vzdalovala

bez projednání další návštěvy  
která se odkládá  
už navždycky

11.2.99

Ĉestmír Vidman

### Adiaŭ al Eva

Kiel povis enteni eta ĉambro  
en la periferio de Prago  
kostumojn de tiuj dekoj da personoj?

Ĉio estis inĝenie kunmetita  
peco en pecon



kiel la famaj rusaj pupoj

Kaj estis tie plu galerio de figuretoj  
de belega betlehema scenejo elmeritita  
de lignoskulptisto Hošek el Dobříš

Kaj etaĝeroj plenaj de libroj ĝisplafone  
Kaj materialo por roloj Kaj kvanto da rekvizitoj  
en tiu ĉambreto

kun tiom da ideoj  
kaj ĉiam kun floroj  
en alto super Prago

Singene mi rigardas tiun teraseton  
de kie vi mansalutis min kiam mi foriradis  
car vi estis foriĝanta

sen pritrakti pluan viziton  
kiu estas prokrastita  
jam por ĉiam

(Tradukis Jaroslav Mráz)

### **Jen angličtina jako mateřský jazyk má šanci**

O významu angličtiny v současném globalizujícím se světě není pochyb. Milióny mladých lidí na celém světě studují tento jazyk s úmyslem využít jeho znalosti ve svém budoucím povolání. Avšak v poslední době stále více různých organizací požaduje, aby uchazeči o zaměstnání byli rodilí Angličané.

Spojené národy a jejich organizace požadují nejen dobrou znalost angličtiny, avšak ve stále větší míře si kladou podmínku „English mother tongue“ (Angličtina mateřský jazyk) nebo „native English speaking“ (rodilý anglicky mluvící).

Druhý článek Všeobecné deklarace lidských práv zaručuje všem obyvatelům celého světa stejná práva bez ohledu na jazyk, společenský nebo národní původ. To však Spojeným národům a jimi financovaným organizacím vůbec nebrání rezervovat pracovní místa pouze rodilým anglicky mluvícím občanům. Pouze tito lidé, pro které je angličtina mateřštinou, mají naději získat některé z rostoucího počtu dobře placených míst.

Mezi organizacemi, požadujícími angličtinu jako mateřský jazyk, je např. Mezinárodní soudní dvůr v Haagu, Mezinárodní ústředí pro genetické inženýrství a biotechnologii v Terstu, Světová turistická organizace v Madridu, Světová zdravotnická organizace v Ženevě, Mezinárodní agentura pro jadernou energii ve Vídni či Úřad vysokého komisaře pro lidská práva v Ženevě.

Tento diskriminační přístup k uchazečům o pracovní místa se však netýká jen OSN a jejích organizací. Jen v roce 2001 vyšlo v bruselských novinách přes 300 inzerátů nabízejících volná pracovní místa rodilým anglicky mluvícím. Většinou jde o evropské organizace financované buď plně nebo zčásti Evropskou komisí. Vůbec se nevyskytují inzeráty požadující znalost jiných jazyků na úrovni mateřštiny.

„Studoval jsem evropskou politiku v Keble College v Oxfordu,“ chlubí se 27-letý Němec žijící v Bruselu. „V mezinárodních nabídkách volných míst vidím často požadavek English native speakers only! a hned vím, že nemá smysl se o toto místo ucházet, třebaže angličtinu ovládám dobře. Ale co mohu dělat? Brusel je velmi malé město a kdybych si stěžoval na některou mezinárodní organizaci, měl bych špatnou pověst u všech ostatních. Musím se tedy zaměřit na hledání takových míst, pro která angličtina jako mateřský jazyk zatím není požadována.“

Čestmír Vidman

**Svícení**  
(Za Evou S.)

Když jste k ní přišli na kus řeči  
zapalovala ozdobnou svíčku  
Shromažďovala je sběratelsky  
vždy nový typ i odstín barev

Plamínek zútulňoval místnost  
během rozhovoru  
Jako by byl někdo další s námi  
kdo nám naslouchal

s pochopením a povzbuzením  
Z širokých svící stékal vosk  
a v kapičkách se srážel v proud  
zachycující se pozvolna po stranách

jako dávná vyhaslá láva  
našich životů  
Stále vidím ten neposedný plamen  
symbol neklidu i stálosti

Dneska dohořel  
už naposled  
Ale až si o příštích vánocích  
zapálíme u stromku svíčku

budu se stále ohlížet  
jestli nestojíš někde za námi

Čestmír Vidman

**Lumado**

Kiam vi venis al ŝi por iom da babilo  
ŝi ekflamigis kandelon  
Ŝi amasigadis ilin kolektante  
ĉiam novan típon kaj kolornuancon

Flameto intimigadis la ĉambron  
dum interparolo  
Kvazaŭ iu plua estus kun ni  
kiu nin aŭskultus

kun kompreno kaj kuraĝigo  
De larĝaj kandeloj malsupren  
fluis vakso kaj en gutetoj koaguliĝis  
fluo kiu lante alteniĝis ĉe flankoj

kiel antaŭlonge solidiĝinta lafo  
de niaj vivoj  
Ĉiam mi vidas tiun petoleman flamon  
simbolon de maltrankvileco kaj subtileco

Hodiaŭ ĝi finbrulis  
jam lastfoje  
Sed kiam ni dum venonta kristnasko  
ekflamigos ĉe la arbeto kandelon

mi ĉiam estos turnanta kapon  
ĉu vi ne staras ie post ni

15.2.99

(Tradukis Jaroslav Mráz)

Günther Verheugen, člen Evropské komise odpovědný za rozšiřování EU, je v rozpacích nad množstvím těchto diskriminačních požadavků, avšak diplomaticky se domnívá, že se jedná jen o nesprávnou formulaci těchto jazykových potřeb.

„V souladu s členskými organizacemi jsme se rozhodli postupovat právní cestou proti těm, kdo vystupují s diskriminačními pracovními požadavky,“ sdělil Marceau Déchamps, generální tajemník společnosti pro obranu francouzského jazyka, Le Droit de Comprendre.

Naproti tomu Renato Corsetti, předseda Světového svazu esperantistů, váhá. Podle něho soudní cesta by nebyla v souladu s mírovým duchem esperanta.

(Podle časopisu Esperanto 3/2002 zpracoval —jpa-)

**Knihy v roce 2001**

Podle časopisu Knižní novinky č. 2 vyšel v České republice v roce 2001 rekordní počet 14 321 knižních titulů, což je téměř o 3 000 více než v roce 2000. V roce 2001 u nás vyšlo 500 knih v angličtině, 137 v němčině, 43 ve slovenštině, 27 ve francouzštině, 23 v polštině, 17 v ruštině a také 3 knihy v japonštině, 2 v esperantu a 1 ve finštině a v hebrejštině. Čtvrtinu všech loni vydaných knih tvořila beletrie, téměř 1750 titulů připadlo na učebnice a vysokoškolská skripta a pro děti a mládež vyšlo 575 knížek.

Loni vyšel v ČR rekordní počet téměř 4400 překladů z více než 40 jazyků. Angličtina si od listopadu 1989 trvale drží pozici nejpřekládanějšího jazyka u nás a loni překlady z angličtiny představovaly více než polovinu všech vydaných překladů. Němčině a francouzštině patří tradiční druhé, resp. třetí místo mezi nejpředkládanějšími jazyky: překlady z němčiny tvořily zhruba pětinu a z francouzštiny dvacetinu všech vydaných překladů. K nejpřekládanějším slovanským jazykům opět patřila polština (71 překladů), následovala ruština (36) a slovenština (32). Loni vyšly i 3 překlady ze staroslověnštiny, 2 mj. z esperanta, nové hebrejštiny a sanskrtu a po jednom také z perštiny, romštiny, tibetštiny nebo staré hebrejštiny. -jpa-

### **Esperantisté předvídali sjednocenou Evropu**

Cílem Evropské unie je prohloubení hospodářské a politické integrace členských zemí. V r. 1952 vzniklo Evropské společenství uhlí a oceli, v roce 1958 Evropské hospodářské společenství a Evropské společenství pro atomovou energii.

V roce 1967 byly sloučeny orgány těchto tří organizací a vzniklo Evropské společenství. Postupem doby k ES přistupovaly další státy a v r. 1992 byla podepsána smlouva o Evropské unii, v které - ve většině jejích států - od letošního roku platí společná měna euro.

Avšak historie snah o evropskou spolupráci je mnohem starší. Tvůrce esperanta L. L. Zamenhof napsal v roce 1915 - v době první světové války - „Výzvu diplomatům“, v které se vyslovil pro to, aby byly vytvořeny jakési mírové „Spojené státy evropské“. Touto myšlenkou se zabýval i německý esperantista Josef Zauner, žijící v Rumunsku, který ve třicátých letech minulého století vydával esperantský časopis UŬE-EĤO pro propagaci Spojených států evropských (v esperantu UŬE). V roce 1934 vydal dopisnici s tímto textem (v esperantu):

Evropané!

1. Vzdor všemu, věřte v Evropskou unii.
2. Ve volbách hlasujte jen pro tu stranu, která bojuje za vytvoření jednotného evropského hospodářského území.
3. Propagujte vytvoření Společného parlamentu z evropských národních parlamentů.
4. Požadujte vytvoření společné Evropské armády a zavedení jednotné Evropské měny.
5. Požadujte autonomii pro státy, území a města ve Spojených státech evropských.
6. Učte se „evropsky“.
7. Respektujte také národnost druhých.
8. Bojujte za odbyrokratizování (odstátnění a odmonopolizování) hospodářství.
9. Bojujte za zákony a instituce, které umožňují svobodný společenský růst, tedy přirozenou třídní změnu.
10. Kdo bojuje za evropské sjednocení, ten urychluje světový mír.

Tyto sny se už uskutečňují a jsme rádi, že evropská jednotná měna má esperantský název euro. (z revue Esperanto 3/2002)

Poetický text Věry Ludíkové „Je jaro“ vydalo pražské nakladatelství Chronos v podobě sličné knížečky v grafické úpravě Zdeňka Wagnera s ilustracemi Jana Kristoforihho. Text „Je jaro“ je uveden v českém originálu a v 36 dalších jazycích, od angličtiny až po esperanto. Tuto jedinečnou knížku v 37 jazycích přihlásila do Guinnessovy knihy rekordů pelhřimovská Agentura „Dobrý den“. Právě vyšla nová kniha Zdenky Bergrové „Šimy a jiné opičárny“ (Pohádky pro zvědavé čtenáře). Knihu v grafické úpravě a s ilustracemi Věroslava Bergra vydalo nakladatelství Riopress Praha. Jednotlivé pohádky z této knihy přinášíme v esperantském překladu; v dnešním čísle je pohádka „Bublina“ - „Bobelo“. Z. Bergrová je zmíněna i v nejnovější knize o české literatuře „Histoire de la littérature tchèque“, která vyšla v Paříži. Je zde uvedeno, že Z. Bergrová má vynikající překlady klasických básníků a rovněž její tvorba je vynikající.

**Kufříkový psací stroj s esperantským háčkem** je na prodej za 200,- Kč. Bližší informace v klubu.

## Konkurso de majstroj

En la jaro 1953 komunistoj likvidis la ĉeĥoslovakon Esperanto-organizaĵon, kaj la esperantistoj devis labori pli malpli private. En tiu malfavora tempo, nome en la jaroj 1953-56, okazis interesa konkurso de la plej bonaj ĉeĥaj esperanto-tradukantoj pri esperantigo de unu el la poemoj de la klasika ĉeĥa poeto Antonín Sova (1864-1928), konsiderata kiel la plej granda reprezentanto de ĉeĥa impresionisma liriko. Elektita estis la poemo *Táborské kraje* (Tábor-aj regionoj) pri la ĉirkaŭaĵo de la sudbohemia urbo Tábor, kiun en la 1420 konstruis husanoj (husitoj), adeptoj de la ĉeĥa religia reformatoro Johano Hus, martire ŝtiparumita en Konstanco en la jaro 1415. La husanojn gvidis kontraŭ invadintaj kruckavaliroj militisto Johano Žižka (legu: ĵiĵka), ĉeĥa nacia heroo, kiun mencias la lasta verso. Tamen la poemo ne memoras la historiajn eventojn, sed elvokas la bildon de la regiono en la tempo, kiam Sova vivis, kvazaŭ pentraĵon.

La konkurson partoprenis Rudolf Hromada (1890-1964), Miloš Lukáš (1897-1976), Tomáš Pumpr (1906-1972), Jiří Kořínek (1906-1988) kaj nun ne plu konata O. Franzl. La traduko de la lasta havas malaltan nivelon, tamen mi lasas ĝin, ĉar per ĝi oni povas vidi malfacilecon de la tradukado kaj majstrecon de la unuaj kvar interpretistoj, kiuj apartenas en la Esperanta poezia traduk-arto al la plej bonaj.

Miroslav Malovec

Antonín Sova

### Táborské kraje

Přec jsou jen chudé táborské ty kraje,  
však mám je rád až k smrti neskonale,  
hor mírné pásmo ve slunci tu hraje  
a žlutne obilí již skorem zralé,  
u silnic v lesích milíř šerem hoří  
a pošta jede truchlivými lesy,  
hajnovny nízké v mladých buků moří  
kdes leží v dříví nakupené směsi,  
jsou města malá, zapadlá a skrytá  
pod lesy mhavými, kde soumrak dýmá,  
cimbuří hradů zbořených tě vítá  
a sláva Žižky v každém koutě dřímá.

### La regiono de Tábor

Malriĉa estas nia Tábor-regiono,  
Sed mi adoras ĝin per amo senmezura:  
En suna bril' jam ludas da montetoj zono,  
Kaj jen flaviĝas greno preskaŭ plen-matura,  
Ĉe vojo en arbaro karbigej' bruletas,  
Poŝtveturilo pasas tra pinaroj tristaj,  
En mar' da junaj fagoj ie siluetas  
Tra inter ŝtip-amas' dometoj forstgardistaj,  
Sub abiaroj, kiuj nebulece fumas,  
Urbeto pli ol unu kuŝas forkaŝita,  
Al ni krenel' kastelruina palpebrumas -  
Kaj ĉiuloke duondormas glor' husita.

*Traduko de M. Lukáš, Hradec Králové, 21/1/56*

### La regiono de Tábor

Malriĉas nur ja Tábor-regiono,  
sed mi ĝin amas ege, senmezure,  
en suno ludas eta monta zono  
kaj flavas greno preskaŭ jam mature,  
ĉe vojoj forstaj brulas karbig-stakoj,  
poŝtist' veturas tra arba' rezigna,  
gardist-kabanoj inter junaj fagoj  
sin kuŝas ie sub amaso ligna,  
la urboj estas etaj, forkaŝitaj  
sub forstoj nubaj, kie krepuskiĝas,  
salutas vin kasteloj detruitaj kaj glor'  
de Žižka ĉie ĉi sentiĝas.

*Traduko de Rudolf Hromada, aprilo 1953*

### La pejzaĝo de Tábor

Profunde kaj ĝisfunde ĝi mian koron tuŝas:  
la region' de Tábor, eĉ se ĝi tre malhava...  
Moderaj montaretoj en suna bano kuŝas  
kaj gren' sur kampoj ondas matura, preskaŭ flava.  
Laŭ la arbar-ŝoseo karbigaj stakoj ardas  
kaj kun melankolio bruas la poŝta ĉaro.  
Maro da junaj fagoj forsto-dometojn gardas,  
kiujn deflanke premas arb-trunkoj kaj ŝtiparo.  
For de la viv-tumulto sin kuŝas etaj urboj,  
sub la arbar-nebulo en ombroj kaj kvieto  
salutas vin kreneloj de disfalantaj burgoj  
kaj dormas glor' de Žižka en ĉiu anguleto.  
*Traduko de Tomáš Pumpr, Praha, 6/12/55*

## Regionoj de Tábor

Malriĉa estas Tábor-regiono,  
sed mi senfinan amon por ĝi havas,  
tie en sun' monteta ludas zono  
kaj preskaŭ jam matura greno flavas,  
ĉe voj' arbara brulas karbigstakoj,  
kaj poŝt' veturas tra malĝoj' arbara,  
arbaristej' en mar' de junaj fagoj  
inter amasoj da lignaro staras,  
malgrandaj urboj perde forkaŝitas,  
inter la forstoj kaj krepusk-nebuloj  
pinakloj burgruinaj vin invitas kaj  
glor' de Žižka dormas en anguloj.

*Traduko de Jiří Kořínek, Brno, 13/2/56*

## Pejzaĝo de Tábor

Nemezureble kara estas la regiono  
apud urb' Tábor al mi, kvankam ĝi nur senhava,  
en sunradioj ludas la montetara zono,  
surkampe maturiĝas jam greno preskaŭ flava,  
laŭ arbaroj bruletas ardejo karbigstaka,  
poŝveturilo triste ruliĝas tra arbaro,  
arbaristejoj basaj en maro kaŭras faga  
malantaŭ longaj vicoj de traboj kaj lignaro,  
urbetoj flanke kuŝas kaj alpremiĝas mute  
al arbarmontoj, kie nebula stri' sin tiras,  
ruinoj de kasteloj invitas vin salute  
kaj glor' de Žižka tie en ĉiu loko spiras.

*Traduko de O. Franzl, Brno, 15/12/55*



## Novaj esperantaj poŝtostampaĵoj

Okaze de 50 jaroj de la Somera Esperanto-tendaro en Lančov la poŝto en Třebíč uzis novan porokazan stampaĵon. Same la poŝto en Kroměříž uzis stampaĵon okaze de la 55-a Tutmonda Kongreso de Katolikaj Esperantistoj.

## Nová esperantská poštovní razítka

U příležitosti 50 let Letního esperantského tábora v Lančově u Vranovské přehrady pošta v Třebíči používala příležitostné razítko. Stejně pošta v Kroměříži používala razítko u příležitosti 55. světového kongresu katolických esperantistů.

**Regulaj kunvenoj de la Esperantista Klubo en Praha** okazas ĉiuŝaŭde de la 13a ĝis la 19a horo en Praha 1, Ve Smečkách-str. n-ro 25. Dum la someraj monatoj la kunvenoj ne okazas. La unua kunveno post la libertempo okazos la 5an de septembro 2002.

BULTENO

**de Esperantista Klubo en Praha**

Věstník Klubu esperantistů v Praze

Redaktor: Jiří Patera

**Pravidelné schůze Klubu esperantistů** v Praze se konají každý čtvrtek od 13. do 19. hod. v Praze 1, Ve Smečkách č. 25. Po dobu letních měsíců se schůze nekonají. První schůze po prázdninách bude 5. září 2002.

Odesílatel:

**Klub esperantistů v Praze**

C/o Jindřich Ondráček

Bubenská 17 170 00 Praha 7